**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg



EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO
27 - 31 majo 1977
en PADERBORN

N-ro 34/76 - 23 aŭg 1976
Aperas ĉiusemajne

## Eŭropa Esperanto-Kongreso 1977

Paderborn (pp) - De la 27-a ĝis la 31-a de majo 1977 okazos en la vestfalia urbo Paderborn, F R Germanujo, la Eŭropa Esperanto-Kongreso 1977.

La provizora programo antaŭvidas jenajn erojn:

Vendredon, la 27-an de majo: Akcepto en la urbodomo fare de la urbestro, Interkona vespero

Sabaton, la 28-an de majo: Vizito al la Kibernetika Instituto kaj FEoLL, aliaj sciencaj aranĝoj; Publika plac-koncerto antaŭ la urbodomo; Vizitoj al urbo kaj muzeo; Oficiala malfermo kun festprelego; Balo por kongresanoj kaj gastoj

Dimanĉon, la 29-an de majo
Publika informado kaj diskutado pri Esperanto kun provlecionoj, helpe de FEoLL, junularo, AGEI, Eŭropa Klubo k.a., Jarĉefkunvenoj de GEA, L.E.E.N., LEA; Diservo subĉiela; Festvespero kun amuzaj muzikaĵoj kaj teatraĵoj

Lundon, la 30-an de majo
Ekskursoj en la Teŭtoburgan Arbaron, arboriĉan montaron proksime de Paderborn; Plurlanda renkontiĝo, vizito al la urbo

Mardon, la 31-an de majo
Tuttaga ekskurso al Weserbergland (montar-regiono proksime de la rivero Weser)

La korespondadreso de la LKK estas: D-ro Hans Kasselmann, Falkenweg 10, D-4790 Paderborn, F R Germanujo, tel. (05251) 61958.

Kongresajn pagojn oni direktu al: Esperanto-Kongress, D-4790 Paderborn, Kontonumero 3100 1910, BLZ 472 50101 ĉe Sparkasse Paderborn.

Validas jenaj kongresaj kotizoj ĝis la 31.12.1976:

Kongresan(in)o 21,- GM Edz(in)o 13,- GM
Studento kaj Lernanto 10,- GM Infanoj ĝis 15 jaroj 5,- GM

### Vizitu Paderborn!

Paderborn, ĉarma kaj fenomenplena urbo en Orienta Vestfalio je la randoj de belaj arbaraj montaroj, invitas la eŭropajn esperantistojn!

+ Unuika estas geografia fenomeno: pli ol 300 fontoj en la urbo!
+ Gravaj estas la historiaj fenomenoj: novaj elfosaĵoj pri la agado de Karolo la Granda - en la jaro 777 lia unua regna kunsido!
+ Vidindaj estas la artaj fenomenoj: i.a. la antikva katedralo kaj la novstila muzeo kun multaj artaĵoj!
+ Rimarkindaj estas la Esperanto-fenomenoj: subita ekesto de Esperanto-vivo, Esperanto-restoracio, eksperimenta Esperanto-instruado!

Petu aliĝilojn ĉe la korespondadreso de la kongreso!

Pri la "Parizaj eventoj"

Parizo (pp) - De la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto okazis en Parizo la 2-a Internacia Konferenco de la "Neŭtrala Esperanto-Movado", kiun ĉeestis 20 - 30 personoj. La konferenco akceptis rezolucion, kiu i.a. okupas sin pri "Fina Akto de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo". En punkto 6 la rezolucio "reliefigas la ekziston de Internacia Esperanto-komunaĵo sendistinge de kiu ajn asocio".

La rezolucion subskribis: J. Thierry, prezidanto; M.V. Vermaas kaj H. Müller, vicprezidantoj; P. Zacho, sekretario.

Reinhard Haupenthal retiriĝis kiel sekretario kaj sin distancigis de la konferenco. La kaŭzon de sia retiriĝo kaj distancigo li klarigis en "publika letero" de la 16-a de aŭgusto direktita al prof. d-ro Ivo Lapenna.

Por la prospero de Bona Espero

Post plurmonata korespondado inter Terres des Hommes, Bona Espero kaj la Esperanto-Rondo Münster la 12-an de aŭgusto 1976 okazis konferenco inter kunlaborantoj de la loka grupo Münster kaj gvidaj funkciuloj de la internacia helporganizaĵo.

Terres des Hommes laŭ sia ĉarto helpas en la tuta mondo al infanoj en malfacilaj cirkonstancoj. Oni iniciatas kaj subtenas helpprojektojn, zorgas pri kuracado, nutras malsatulojn, peras adoptajn gepatrojn ktp. La organizaĵo, kies sidejo estas Osnabrück, ankaŭ korespondas kaj varbas en Esperanto.

La kunvenintoj diskutis la eblon, fondi projektgrupon inter Esperantistoj kun la celo, prosperigi nian infanvilaĝon Bona Espero en Brazilo. La aspektoj estas esperigaj, ke la estraro de Terres des Hommes akceptas la komunan proponon kaj sendas en aŭtuno projektkonsilanton por inspekti la lokan situacion.

Al individuaj Esperantistoj kaj al grupoj, kiuj pretas kunlabori, ni volonte donas informojn pri Bona Espero kaj Terres des Hommes. Informojn donas: S-ino Ursula Schrapp, Schmittingheide 17 d, D-4400 Münster, F R Germanujo.

Willi Brandenburg

Diskutado kun politikistoj

Offenbach (pp) - Esperanto Informo Offenbach e.V okazigos podiodiskutadon kun reprezentantoj de politikaj partioj pri la temo "La lingvoproblemo en Eŭropo", ĵaŭde, la 26-an de aŭgusto en la Granda Salono de la Popolaltlernejo en Offenbach.

Dana-Sveda Esperanto-Tago

Ringsted (pp) - Laŭ "La Folio", organo de Klubo Esperantista de Malmö, la 5-an de septembro 1976 okazos en la dana urbo Ringsted la 32-a Dan-Sveda Esperantotago. Krom diversaj vizitoj kaj kunestadoj la programo antaŭvidas ankaŭ akcepton fare de la urbestro de Ringsted, s-ro G. Møller Rasmussen.

Informvespero en Bremen

Bremen (pp) - La 8-an de septembro la Esperanto-Grupo Bremen aranĝas informvesperon kun lumbildprelego, provleciono, libro-ekspozicio en Bundesbahngebäude beim Findorfftunnel, Bremen, Findorffstr. 13, je la 20-a horo.

Cetere la grupo eldonas regule - ĉiam interesan - informilon sub la redaktado de Heinz Dieter Hartig.

Malantaŭ la ĉina muro

Winterthur (pp) - En la svisa ĵurnalo "Der Landbote" denove aperis interesa artikolo pri Esperanto. Sub la titolo "Malantaŭ la ĉina muro" la artikolo, kiu estas signita per "a.b.", priskribas la nunan situacion de Esperanto en Ĉinio surbaze de la raporto de UEA-estrarano E.J. Woessink en la revuo "Esperanto". Sinjoro E.J. Woessink kaj lia edzino, kiel Pilo-Press jam raportis, restadis printempe en Pekino dum kvar tagoj, kie ili renkontiĝis kun reprezentantoj de Ĉina Esperanto-Ligo kaj El popola Ĉinio.

Ferioj por familioj

Darmstadt (pp) - La heslandaj naturamikoj aranĝis en julio feriosemajnon por familioj en malgranda naturamika domo, malproksime de vilaĝoj en la arbaro de la Odenwald. Ili multe migris kaj ludis en kaj ĉirkaŭ la domo. La bonhumoro de la infanoj kompensis la mankantan sunon. Bedaŭrinde ĉi-foje mankis negermanaj partoprenantoj.

"Esperanto kaj familio" estas bedaŭrinde en Esperantujo ne jam populara, opinias Eki Woite, la aranĝanto de la ferioj. Multaj aktivuloj ĉesigas sian laboron por Esperanto, kiam infanoj venas. Ferioj por familioj povas esti rimedo kontraŭ tiu negativa fenomeno.

De la 1-a ĝis la 3-a de oktobro la esperantistaj familioj renkontiĝos en la naturamika domo Dieburg apud Darmstadt, kie oni faros decidon pri la venontjara ferioj.

Informojn, speciale al partoprenemaj interesuloj, donas: S-ro Eki Woite, An der Kirche 33, D-6115 Münster, tel. (06071) 33568.

Radio Vieno denove pri Robert Stolz

Vieno. En sia Esperanto-Programo de la 21-a kaj 22-a de aŭgusto ORF, Vieno dediĉis al la aŭstra komponisto kaj Esperanto-amiko Robert Stolz mallongan memorigan felietonon verkitan de D-ro Karl Beckmann. Ĝi tekstas:

"En Graz, Stirio, en la jaro 1880, la altkvalite muzikista paro Jacob kaj Ida Stolz donacis ne nur al Aŭstrio, sed al la tuta mondo unu el la plej fruktodonaj, plej serenaj muzikgenioj, nome sian plej junan filon Robert. Se la morto ne estus lin forpreninta antaŭ nur malmulte pli ol unu jaro, li povus festi, la 28-an de aŭgusto, sian 96-an naskiĝtagon.

Sed per sia muziko li ankoraŭ vivas por n i, ni do feste memoru tiun datrevenon kun ĝoja dankemo.

En tiu sama senco sinjorino Charlotte H u b e, edzino de d-ro Walter Hube, direktoro de la Internacia Esperantomuzeo en Vieno, nun kantos por vi, akompanate de s-ino Hedy Frimmel-Pohl, la tre konatan melodion "Du sollst der Kaiser meiner Seele sein", laŭ teksto esperantigita de la vienano, oficonsilisto Hugo Kraus, sub la titolo "Animon mian ame regu vi".

La kanto, artece prezentita, estis bone aŭdebla, eĉ mallongondaj cirkonstancoj permesis ĝuon. Tio jam estas la tria Robert-Stolz-kanto, kiun prezentis en Esperanta versio s-ino Hube en la Esperanto-elsendoj de la Aŭstria Radio.

Japana vizito al Vieno

Vieno (pp)- Partopreninte la Universalan Kongreson en Ateno, grupo de 18 japanoj kaj 3 koreanoj alvenis dimanĉon, la 8-an de aŭgusto, tagmeze en la viena flughaveno Schwechat, kie s-ro Emil Vokal salutis ilin nome de AEF. La gastoj restis du tagojn en Vieno.

Esperanto en Radio

Vatikano respondas

Vatikana Radio dissendis duan cirkuleron, respondante al la plej oftaj demandoj kaj kritikoj. La letero, precipe, alfrontas la problemon de la horo de elsendo (30 minutoj post la noktomezo inter sabato kaj dimanĉo, laŭ la mezeŭropa tempo), agnoskante, ke ĝi ne estas ideala; sed la pli taŭgaj horoj jam estas okupitaj de aliaj programoj, tiel ke, por kontentigi la deziron de la esperantistoj, Vatikana Radio povis ludi nur la karton, pri kiu ĝi disponis. Tamen, oni konscias, ke ĝi estas provizora solvo, kaj apenaŭ eble oni transpasos al pli kontentiga horo el la vidpunkto de aŭskulto-komforto, kvankam oni devas memorigi, ke la nokto estas la plej taŭga tempo, el teknika vidpunkto, por elsendi je longa distanco.

Koncerne programojn, ilia mallongeco dependas kaj de la momenta personara situacio (kiu baldaŭ normaliĝos) kaj de la fakto, ke oni moviĝas sur eksperimenta vojo. Pro tio oni ankoraŭ ne povis doni definitivan informan karakteron al la Esperanto-programo, aŭ dediĉi al ĝi pli longan tempon.

La malfacilaĵojn oni povas superi, precipe se la esperantistoj montros daŭran kaj viglan interesiĝon je la problemo, instigante multajn petojn al la Vatikana Radio. Skribante, oni ne forgesu reliefigi, ke oni rilatigas sin al la Esperanto-programo.

La septembra programkajero de Vatikana Radio denove entenas tipografie impresan atentigon pri la Esperanto-programo kaj la nepra neceso de vasta eĥo, se ĝi pludaŭru kaj laŭeble kresku. Skribu do al Radio Vaticana, Cittá del Vaticano.

Radio Vieno. La 5-minutaj Esperanto-programoj de Radio Vieno, sur ultra-kurtondoj, ĉiun duan ĵaŭdon je la 18,40 horo, denove estas aŭdeblaj ankaŭ sur meza ondo 203 metroj. La proksima elsendo okazos ĵaŭdon, la 2-an de septembro, je la 18,40 horo. Eksterlandaj esperantistoj provu kapti ankaŭ tiujn elsendojn kaj raporti pri la aŭdebleco. Adreso: CRF, Esperanto-Redakcio, A-1136 Wien, Aŭstrujo.
En la mallongondaj elsendoj de la 4-a kaj 5-a de septembro oni aŭdos raporton pri la japana vizito al Vieno, pri kiu ni mallonge informis sur paĝo 3.

Svisa Kurtonda Servo. En la pasintsemajna intervjuo de Claude Gacond kun d-ro Richard Wood la intervjuito donis konsilojn por aŭskultantoj sur mallongaj ondoj. D-ro Wood estas fakulo sur tiu kampo kaj posedas specialan radio-aparaton, kiu ebligas la aŭtomatan trovon de la koncerna frekvenco. Li informis ke la Esperanto-programoj troviĝas sur la 30-a loko de la skalo monda por mallongondaj elsendoj. - Vane oni atendis la Esperanto-elsendon kun parolado de d-ro Arthur Baur lunde, la 23-an de aŭgusto. Certe temis pri teknika eraro, kiu ne ofte ripetiĝos, aŭ tro abunda materialo en la antaŭa franclingva programo.

Radio Varsovio. Post la dimanĉaj elsendoj kun sonraportoj el Ateno la lasta Esperanto-Ekspreso denove estis la "normala" kun kutimaj eroj, i.a. kun raporto pri la SAT-kongreso kaj rubriko "Novaĵo de Pilo-Press. - Ankaŭ la Esperanto-anguleto kadre de la germanlingva programo citis eron el Pilo-Press pri aktuala informado kun interesa komento de Jerzy Grum. - En la semajno de la 12-a ĝis la 18-a de aŭgusto la Esperanto-redakcio ricevis 97 korespondaĵojn. Entute ĉi-jare la redakcio de la Esperanto-elsendoj ricevis 3 581 korespondaĵojn. La Panoramo de Internaciaj Eventoj kaj politikaj komentarioj multe temis pri la konferenco de eksterblokaj ŝtatoj aŭ de ne-engaĝitaj ŝtatoj.